

KNABO, PAROLAS MI AL VI: LEVIĜU - Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Luko 7, 11-17

En tiu tempo Jesuo iris al urbo nomata Naim; akompanis Lin liaj disĉiploj kun granda homamaso. Kaj kiam Li alproksimiĝis al la urba pordego, jen oni alportis mortinton, la unusolan filon de vidvino. Akompanis ŝin granda homamaso el la urbo.

Kiam la Sinjoro vidis ŝin, Li kortuŝiĝis, kaj diris al ŝi: „Ne ploru!” Poste Li alproksimiĝis kaj tuŝis la ĉerkon. La portistoj haltis. Tiam Li diris: „Knabo, parolas Mi al vi: leviĝu!” Tiam la mortinto leviĝis kaj komencis paroli. Kaj Jesuo redonis lin al la patrino. Timo kaptis ĉiujn, kaj ĉiuj gloris Dion, dirante: „Granda profeto leviĝis inter ni!” Aliaj diris: „Dio vizitis sian popolon.”

Kaj ĉi tiu famo pri Li disiris tra la tuta Judeo kaj tra la tuta ĉirkaŭaĵo.

La profetoj bildigis la rilaton inter Dio kaj lia popolo pere de la bildo de iu geedziĝo. Dio estis la novedzo kaj Izraelo la novedzino. Sed, pro la pluraj malfidelecoj, pro la perfidoj de tiu ĉi popolo, tiu geedziĝo estis jam konsiderata finita kaj la Izraela popolo sin konsideris vidvino, senedzulino (la edzo estas tiu kiu donas protekton, sekurecon al sia familio).

Estas en tiu ĉi kultura konteksto ke ni devas legi epizodon kiun havas nur evangeliisto Luko, je ĉapitro 7, versikloj 11-17, kaj temas pri la releviĝo de la knabo de Naim.

Ni vidu kion diras la evangeliisto. *Sekve...* la Evangeliisto sekvigas tiun epizodon al alia grava, kiam Jesuo estas vokita, preĝpetita por helpo fare de roma centestro. Tiu reprezentis la paganan mondon kiu petas la intervenon de Jesuo. Sufiĉis la nura vorto de Jesuo por kontentigi la atendojn de la centestro, kaj Jesuo, mirigita, eldiris grandan laŭdon: "*En Izraelo mi ne trovis tiom grandan kredon*".

Tuj poste fakte la evangeliisto bildigas al ni kiu estas la situacio de Izraelo, tiu popolo jam sen kredo. Ni legu. *Sekve...* rilate do al la epizodo de la centuriestro, *Jesuo iris al urbo nomata Naim*. Nai estas vorto kiu verŝajne signifas "ĉarma, plaĉa", kaj troviĝas apud Nazaret. *Akompanis Lin liaj disĉiploj kun granda homamaso*.

La evangeliisto emas ofte kontraŭigi du procesiojn, unu de vivo kaj unu de morto. Li tion jam faris en la momento de la prezento de Jesuo al la templo, kiam la gepatroj iras al la templo por respekti la leĝon, kaj de ĝi eliras Simeono, kiu klopodas malebligi la senutilan riton.

Ankaŭ en tiu ĉi kazo estas du procesioj kiuj renkontiĝas. Unu, tiu de Jesuo kun liaj disĉiploj, estas portanto de vivo, dum de la urbo eliras procesio, kiu estas portanto de morto. Fakte, skribas la evangeliisto, *kiam Li alproksimiĝis al la urba pordego, jen oni alportis mortinton, la unusolan filon de vidvino*.

Temas pri tragedio. Temas pri tragedio ĉar la patrino vidviniĝis, ŝi do ne havas edzon, ne havas aliajn filojn, neniun kiu povas certigi al ŝi vivtenadon, kaj do estas morto ankaŭ por ŝi. *Akompanis ŝin granda homamaso el la urbo*. Jesuo do, portanto de vivo, direktiĝas al tiu ĉi urbo, sed de tie eliras la morto. La tuta homamaso ne kapablas ripeti ion alian ol la mortoritoj tipaj de mort-religio.

Kiam la Sinjoro vidis ŝin... La unuan fojon la evangeliisto utiligas tiun esprimon, indikante jam la releviĝintan Kriston... *Li kortuŝiĝis*. En la hebrea mondo oni distingas inter kortuŝiĝi kaj indulgi. Indulgi estas sinteno de la homoj, sed kortuŝiĝi estas nur dia agado. Ĝi estas agado per kiu oni komunikas, oni redonas vivon al tiu, kiu vivon ne havas.

En la evangelio de Luko ni ĝin trovas trifoje, tiu estas la unua, poste en la parabolo de la Samariano, kiam Jesuo ĝin atribuas eĉ al iu homo, aldone herezulo, ĉar li kondutas kiel Dio kaj do komunikas vivon, kaj fine en la

parabolo de la erarinta filo, kiam la patro, vidante la filon, kiun li konsideris mortinta, kortuŝiĝis.

Tiu 'kortuŝiĝo' do signifas dian agon per kiu oni komunikas, redonas vivon al tiu, kiu ĝin ne havas. *Kaj diris al ŝi: „Ne ploru!” Poste Li alproksimiĝis kaj tuŝis la ĉerkon.* En la antaŭa epizodo kun la centestro sufiĉis la vorto de Jesuo, kial ĉi tie Jesuo tuŝas la ĉerkon? Ĉar tio estis malpermesita. La leĝo malpermesis tuŝi ĉerkon, tie, kie per 'ĉerko' oni celas simplan brankardon kaj la mortinto estis kovrita per littuko. Estis malpermesite ĉar tiu, kiu tuŝis kadavron aŭ ĉerkon estis trafita de malpureco.

Tiel Jesuo evidentigas la falsitecon de tiu leĝo, ĝin malrespektas kaj tuŝas la ĉerkon. Li volas komprenigi, ke la kialo de la morto de tiu ĉi popolo estas la respekto de iu leĝo favora nur al si mem, leĝo kiu ne servis la bonon de la homo, sed nur tiun de la reganta sacerdota kasto. La leĝo estis ilo por regi, por subpremi la popolon kaj la rezulto estas ke la popolo mortas.

Tuŝis la ĉerkon, dum la portistoj haltis. Tiam Li diris: „Knabo, parolas Mi al vi: leviĝu!” Tiam la mortinto leviĝis kaj komencis paroli. Paroli estas la evidenta pruvo de la reveno al la vivo. *Kaj Jesuo redonis lin al la patrino.* Jesuo do relevas la esperojn de sia popolo kaj certigas ĝian estontecon. *Timo kaptis ĉiujn, kaj ĉiuj gloris Dion, dirante: „Granda profeto leviĝis inter ni!”* Kial li estas granda profeto?

La evangeliisto konstruas la rakonton sur epizodo, kiu enestas la Unuan libron de la Reĝoj, ĉapitro 17, kie la grandega profeto, tiu kiu estis atendanta refoje por glatigi la vojon de la Mesio, granda Elia, relevis la filon de la vidvino de Sarepta. Do, tiel kiel Elia relevis tiun knabon, tiel same Jesuo.

La amaso do vidis en Jesuo la novan Elia-n, tiun. kiu devis pretigi la vojon al la mesio. *Aliaj diris: „Dio vizitis sian popolon.”* Komence de la evangelio, en la Himno de Zakaria, Zakaria la sacerdoto laŭdis la Sinjoron kaj diris: *Benata estu la Dio de Izraelo, ĉar li vizitis kaj elaĉetis sian popolon.* La vizito de la Sinjoro estas por ĝin liberigi, la popolo do vidas en la ago de Jesuo iniciaton celantan ĝin relevigi.

La efektive relevita ne estas tiom la knabo, kiom la popolo, kiu kuŝis en mort- en mallum-kondiĉoj, kaj Jesuo, la liberiganto, venis por ĝin relevi.

Kaj ĉi tiu famo, laŭlitere la vorto indikas 'vorton, mesaĝon', estas la mesaĝo entenata en tiu ĉi epizodo, pri Li disiris tra la tuta Judeo kaj tra la tuta

ĉirkaŭaĵo. Kaj la evangeliisto pretigas la respondon kiun Jesuo donos al la senditoj de Johano la Baptisto.